Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

https://translate.google.com/ http://vortaro.net/

PLENUMITA 09/03/2017 Tricentdekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)



Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale



SENDATA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Oni povos metu siajn nomon, retadreson, kaj nomon de siaj lando kaj urbo al la ricevanta listo rspring@tpg.com.au

Ekstudis pli ol **762,000** lernantoj en la Esperanto-kurso de Duolingo.
https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online (Ekde la 28a de Majo 2015)



La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine **Feliĉan renaskiĝtagon !**

★★★

Ĉu estas Hitler kiu decidis fari la Duan Mondmiliton?







Antaŭ ol universitatumi en la dua duono de la mondmilito, mi de 1938 ĝis 1943, do antaŭ kaj sub Hitler dum la milito , salajre laboris tre malaltrange en malgranda nederlanda banko kiu estis filio de granda germana bankogrupo. Ĝi havis unue du germanajn kaj unu nederlandan direktorojn, kiuj ĉiuj estis kontraŭ Hitler, sed nepublike. La germana registaro sciis tion, kaj tial devigis la bankon aldoni por-Hitler'an kvaran direktoron germanan. Ĉar mi deĵoris ĉe la klientkaso, mi havis ofte multe da tempo por legi la ĵurnalon. Sed anstataŭe mi legis la Marx'an libron La Kapitalo, Das Kapital. La plej potenca direktoro iam rigardis la libron por scii kion mi legis. Ne sekvis problemoj pro tio. La banko ankaŭ havis ekonomie kaj tial finance tre utilan oficiston judan, kaj por ŝirmi lin kontraŭ la hitlera polico ĝi zorgis ke lia judeco oficiale forviŝatu. La hitlera spiono/direktoro ne sciis pri tio. Do la

oficisto ne sendatis al koncentrejo. La du nederlandaj kaj unu germana subdirektoroj, ĉiuj kontraŭ Hitler, faris la tagan direktoran laboradon. La spiono/direktoro neniam faris laboron por la banko, kaj li ofte vojaĝis pagita. Post la milito la nederlanda registaro volis kortume akuzi lin pro multaj ekonomiaj krimoj, sed la usona registaro devigis la nederlandan forlasi la akuzojn, ĉar li havis, kiel germano, kapitalajn interesiĝojn en Usono.





Ni scias, ke landon regas pluraj precipaj grupoj de kapitalistoj, nuntempe kvar en Usono. Mi ne scias kiuj grupoj regis Germanujon dum Hitler, sed mi scias ke du el la plej potencaj estis la ferindustrio kun Krupp kaj la tekstilindustrio. La lasta estis ligita al la belguja kaj al la brituja tekstilindustrio, do ne havis ties konkurencon. Konsekvence la batalo inter la tiamaj germanujaj kapitalgrupoj estis inter la tekstilindustrio kiu ne deziris militon kaj aliflanke la ferindustrio, kiu deziris la militon. La ferindustrio estis la plej forta, kaj gajnis, verŝajne pro la helpo de aliaj kapitalgrupoj, kaj Germanujo devis militi. Tion mi lernis de mia laborejo, la germana banko, kiu multe ligiĝis al la tekstilkapitalaro. Ne mirindas, ke ties germanaj direktoroj kaj oficistoj estis kontraŭ Hitler. Mi demandas min, ĉu nuntempe la ferindustrio de Usono planas devigi Trump'on fari militon.

Duonvoje en la dua mondmilito fariĝis tro danĝera vojaĝi kaj mi do forlasis la bankpostenon. Mi tamen regule biciklis al diversaj lokoj, sed ne sur ĉefvojoj. Mi ja regule iris al mia veljaĥteto kaj vintre glitkuri, kaj regule al la hejmoj de profesoroj, por studi. Mi sukcesis, dum la tri jaroj, nekaptati de la germana polico, kvankam trifoje apenaŭ. Junuloj de mia aĝo ja devis labori ĉe la germanoj. Mi neniam kunlaboris, kvankam amikoj faris, kun la t.n. subterarmeo, ĉar multaj en ĝi estis politike tre konservativaj, kaj mi estis marksisto. Sed tio estas alia rakonto.

★★★

Marcel Leereveld.

P.S. Dankon al Vera kaj Chris, kaj aliaj, pro ilia interesiĝo en miajn artikolojn pri la arĥitekturo kaj la spirito de Esperanto. Mi esperas kontentigi ilin dum pliaj jaroj. *Marcel.*

★★★



La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian Sabatojn je la 10atm.
Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagata kafo

Je la 4a de Marto venis nur du, Roger Springer kaj Rainer Kurz.
Eunice konfuziĝis en sia hejmo do John veturigis ŝin al la malsanulejo. Chris malsanetis kaj ne povis veni al ĉi tiu kunveno.. Estis tuttagpluva tago kaj estis malfacila ellitiĝi.
Roger Springer



(Por havi raporton en AE, via klubo sendu informon/raporton al AE)

★★★




El Adelajdo



La unua merkredo de Marto estis la tago de la Jarkunveno de sudaŭstralianoj. Ni resumis la pasintan jaron, reelektis la ĝisnunan estraron, planis la agadon por ĉijare. La plej aktuala tasko estas organizi mallongan, enkondukan kurson de Esperanto por la 25-a kaj 26-a de Marto. Nia juna samklubano Benno Lang rete desegnis la afiŝojn, ni mendis la ejon kaj Sandor akceptis la taskon de instruisto.

Sandor estis la centro de nia atento ankaŭ post la fino de la jarkunveno, ĉar li rakontis al ni pri sia infan- kaj junaĝo. La historio de lia familio estas ege interesa. Ni aŭskultis kun atento. *Katja Steele*


La Jarkunveno


Sandor rakontas

Novaĵservo Ret-Info / Lingvo-Studio

LITERUMILOJ KAJ ORTOGRAFIA KONTROLADO EN ESPERANTO



Lingvoilo *(LanguageTool)* estas liberkoda plurlingva programo por kontroli ortografion, gramatikajn erarojn kaj stilon de Esperantaj tekstoj. Ĝi funkcias ankaŭ por pluraj aliaj lingvoj.

"Lingvoilo" atentigas ankaŭ pri eraroj, ne trovitaj per simpla literuma kontrolilo.

Estas avantaĝo de Lingvoilo, ke oni povas uzi la programon ne nur en ĝia retejo, sed oni povas elŝuti kromaĵon *(suplementan aldonan programeton)* por sia retumilo. Post la instalado sufiĉas nur marki iun tekston per la muso, kaj la kromaĵo povas tuj indiki la eventualajn literumajn aŭ gramatikajn erarojn... (!)

Prizorganto kaj programisto de Lingvoilo estas Dominique Pelle. - Dankon al li!

Lingvo-Studio, L.S.
www.eventoj.hu

Adreso de Lingvoilo: https://languagetool.org/eo/

Ekzistas ankau du aliaj, bone funkciantaj literumiloj kaj kontroliloj de ortografio:

– **Lingvohelpilo** ĉe http://visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

– **Esperantilo** ĉe http://www.esperantilo.org

AEA informas.

Aŭstralia Esperanto-Asocio C/- G.P.O. Box 2122, Melbourne 3001

2017-02-23 AEA raportas:

Nian lastan Skype estrarkunvenon ĉeestis:
Heather, Indrani, Joanne, Jonathan, Sandor; Ilia el Indonezio, Bradley el NZ

(1) DUA TRI-LANDA KONGRESO EN BEKASI (28/3 – 2/4/2018)

Ni daŭrigas la preparadon por la dua trilanda kongreso en Marto 2018 en Bekasi.
* La proponita ejo **Aston Imperial Bekasi Hotel & Conference Center**, estas iomete multekosta,…. La LKK esploras aliajn eblecojn. Ili prezentos novan kongresejon venontfoje.
* Mark Fettes ne povis akcepti nian inviton.
> Ni invitis Humphrey Tonkin. Li montris intereson.
* Sandor petos liston de eblaj artistoj por la kongreso. Ni esploros pli dum la venonta kunveno.
* Ni diskutis financajn aferojn por la kongreso. Heather preparas proponitan budĝeton. Kiom da mono ni (AEA kaj NZEA) pagos por la kongreso.

(2) NIA VENONTA SOMERKURSARO/KONGRESO JANUARO 2019

Ni daŭrigis diskuti pri la loko de nia somerkursaro/kongreso en Januaro 2019:
Novzelando? Adelajdo? Bradley esploros….. Joanne preferas eventon ene de Aŭstralio.

(4) KIU ESTAS KIU?

Katja Steele kaj Charles Stevenson ŝatas krei libr(et)on pri aktivaj esperantistoj en Aŭstralio. Vivantaj kaj mortintaj.
AEA subtenos la projekton kaj promesis presi la libron kiam ĝi estos preta.
Bv kontribui kiam Katja kaj Steven petas vin kontribui.


(3) VINTRAJ KURSAROJ

Ni daŭrigis esplori la ideon starigi kelkajn vintrajn kursarojn dum la longa semajnfino de la naskiĝtago de la Reĝino (10/11-a de Junio 2017)
Krom Adelajdo, la aliaj homoj ne montris grandan entusiasmon.

Venonta kunveno: 09/03/2017 je la 17:00 (Melburna tempo)

Heather, Indrani, Joanne, Jonathan, Sandor

“Captain Fantastic” Kapitano Elstarega



Du interesaj artikoloj kiuj aperis en "Recenzo" (Esperanto, Decembro 2016, p.259), rekomendas la filmon "Mirindan Kapitanon".

Xavi Alcade kaj Gian Carlo Fighiera skribis ke tiu elstara filmo ricevis kelkajn premiojn por ĝia bona fotografio, homeco kaj filozofiemaj temoj.

Kompreneble, tial ke la ĉefroluloj parolas iom da esperanto, tre klare, la filmo estas signifoplena por ni.

Estas ege bona reklamo.

Oni diras ke en Italio mem, la filmo estis projekciata en 675 kinejoj tage.



Ĉu "Captain Fantastic" oni povas jam spektati en Aŭstralio?

Bona ekskurso por kluboj. *Chris Holliss*

★★★★★★★★

Vidu AE296 AE297 Ĉi tiu 2016 filmo uzas Esperanton en unu sceno

(https://youtu.be/oqQ-tHVb49w?t=10 *Klaku kaj mem aŭskultu kaj vidu*)



★★★

GRAMATIKA EKZERCO. 11.



La kernvorton substantivan povas difini sola vorto, plej ofte adjektivo. Tiujn difinantajn solajn vortojn, la adjektivojn kaj la adverbojn, oni nomas Epitetoj. Ili povas esti pluralaj, kiel la jenaj:

1). LA JUNA kaj ENTREPRENEMA amiko (Subjekto) volas STARIGI kaj PRIZORGADI (Predikato.) MALGRANDAN sed SUFIĈAN budon (Objekto) en la FLORANTA kvankam NOVA bazaro (Adjekto).

2). LA TUTAN semajnon sen MERKREDO (Adj.) ni (Subj.) kutimas MANĜi kaj TRINKi (Pred.) je LA OKA kaj LA DEKTRIA kaj LA DEKNAŬA (Adj.).

Tiujn epitetojn povas difini aliaj epitetoj, plejofte adverboj, ekz. “La PLEJ alta kaj SUFIĈE longa ponto (Subj.) transiras (Pred.) la EGE belan riveron (Obj.) antaŭ la IOMETE akra bendo (Adj.).”

★★★★ Marcel Leereveld.

"**Anonco**: Se vi kontaktos <www.greenpeace.org.au> vi povos ricevi leteron de la juna Esperantisto Jonathan Moyle, kiu por Greenpeace gvidas la batalon por savi la arbarojn de la orangutanoj". Dankon, Marcel.

★★★

Duonaglutinaj kunmetoj.



En mia artikolo pri la dek manieroj fari aglutinajn kunmetojn ĉeestas unu speco pri kiu mi menciis, ke la kunmetoj limigiĝas al adjektivoj kaj adverboj, ne enlasante kunmetojn substantivajn (nek verbajn), kvankam ili

estas kunmetoj de substantivo kun sia adjektivo (aŭ verbo kun sia adverbo), ekz. "ruĝa rozo" povas kunmetati al "ruĝroza" (kaj "ruĝroze), ne al "ruĝrozo". Nek "rapide manĝi" al "rapidmanĝi" nek "terpomojn manĝi" al "terpommanĝi". La tialo estas, ke ĉe substantivigo ne ĉeestas la necesa nocio de specialeco, nek ĉe verbigo al "rapidmanĝi" aŭ al "terpommanĝi". Do ni ne kunmetas esprimojn kiaj "ruĝrozo" kaj "rapidmanĝi" kaj "terpommanĝi". Nur eblas "ruĝroza/e" kaj "rapidmanĝa/e" kaj "terpommanĝe/a". La samo okazas ĉe etnaj aglutinaj lingvoj. Cetere la lingvo ne bezonas tiajn substantivajn aŭ verbajn kunmetojn.

Se ni observas ekz. la aglutinan kunmeton "tablotuko" ni povas vidi, ke "tablotuko" ne estas iu ajn tuko hazarde uzata por kovri la tablon, sed ke ĝi estas speciala, speciale fabrikita aŭ speciale formita kaj uzata por kovri tablojn, ne por kovri aliajn aferojn. Do necese ĉeestas la nocio de specialeco. Tiu neceso ĉeestas ĉe ĉiuj aglutinaj kunmetaĵoj, en Esperanto kiel en la etnaj lingvoj, kvankam ne ĉiam facile observebla.

Se ni observas la vorton "grandĝardeno" farita el "granda ĝardeno", ni konstatas ke "grandĝardeno" ne estas speciala ĝardeno, sed ke ĝi povas esti iu ajn speco de ĝardeno. Ja iu ajn ĝardeno povas esti granda. Do mankas la nocio de specialeco. Ĝi do ne estas aglutina kunmeto. Tial ni ne uzu nek uzas ilin. Same ni ne uzas "ruĝrozo" por ruĝa rozo, nek "longvojo" por longa vojo. Similas kunmetoj de verbo kun sia adverbo aŭ kun sia gramatika objekto. Sed tuj kiam oni ŝanĝas la kunmeton al adjektivo aŭ al adverbo, ĝi ekhavas la nocion de specialeco kaj do povas uzati. Ekz. "ruĝroza bukedo" kaj "rapidmanĝe prepari sin" kaj "fiŝmanĝa birdo". Tiaj kunmetoj de substantivo kun sia adjektivo kaj de verbo kun sia adverbo aŭ rekta objekto do estas duonaglutinaj, ja eblaj nur ĉe kelkaj vortkategorioj, ĉe kelkaj specoj de kunmetado, dum obeiĝas ĉiuj aliaj kondiĉoj por la procedo de aglutinado. La samo okazas en la etnaj lingvoj aglutinaj.

Tamen Zamenhof kreis sufiĉe multajn tiajn kunmetaĵojn, precipe substantivojn, sed kun figura senco kaj tial enhavantajn la necesan specialecon. Li imitis tiel la germanan lingvon, kiu tamen havas malpli da ili (ekz. Hochschule - altlernejo). Sed la kreeblo evidente malmultiĝis, kaj nun ni tre malofte faras tiajn, kvankam akceptante kaj uzante la jamajn. P.A.G. mencias centojn da ili en paragrafo 424, preskaŭ ĉiuj Zamenhof'aj, sed forte avertas nin ne fari pli da ili (vidu paragrafon 423). Marcel Leereveld.

la tria kvizo

P.S. Jen la tria kvizo, tre malfacila, pri la angla lingvo sed solvebla per Esperanto:
Ĉu la anglaj vortoj "browneyed" kaj "brownbodied" kaj "strongheaded" estas participoj aŭ ne? Kaj kial? M.L.

Prelego: Kial lerni Esperanton?

Merkredon, 15an de Marto 2017, 14:00 bis 16:00, Esperanto Domo, 143 Lawson Street, Redfern
Esperanto estas eble la plej facila lingvo por lerni. Kelkaj personoj lernas ĝin ene de 20 horoj.
Ĉi foje ni provas esti eĉ pli ambiciaj: Ni provos celi ke vi parolos ĝin ene de 2 horoj!

En ĉi seminario ni kovros la sekvajn:

- o Faktoj kaj baza ideo de Esperanto
- o Historio
- o Fortoj kaj malfortoj
- o Prononco
- o Gramatiko
- o Kafo kaj teopaŭzo (senpage)
- o Vortprovizo
- o Kiel uzi Esperanton en Sidnejo
- o Kiel uzi Esperanton dum vojaĝo
- o Kiel uzi Esperanton se vi ne volas forlasi vian hejmon
- o Kiel fariĝi Esperanto-fakulo

La prelegisto Rainer Kurz estas esperantisto el Germanio kiu vizitas Aŭstralion. Li eklernis Esperanton dum 20 horoj ĝis li faris sian unuan Esperantovojaĝon (tra Japanio). Intertempe li uzis Esperanton por vojaĝi al pli ol 40 landoj. *Rainer Kurz*




Katarakto

http://edouard.benois.pagesperso-orange.fr/katarakto.htm







Mi havis katarakton en mia maldekstra okulo
La sola efika kuracado de katarakto estas kirurgio

La ret-ligo montrata supre, bone eksplikas tiun malsanon

Do finfine venis la tempo por la kirurgio.

Merkredon, la 8an de Marto, mi iris al la malsanulejo por la operacio, kiu kostis pli ol $3000. Estis taga vizito al la malsanulejo.

Mi elektis lenson de unu kaj duonmetra fokuso, ĉar mi kutimis al la oportuno legi, se necese, sen okulvitroj. *(Unu okulon aŭ du okulojn jen AE Roger Springer)*



MONDA TAGO DE VIRINOJ

Je la 8-a de Marto

Tiu ĉi tago estas grava festotago pri la atingitaj ekonomiaj, politikaj kaj sociaj rezultoj de Virinoj.

Ĉi jare, per la blogo Paiva Netto, la verkisto omaĝas ĉiujn virinojn de nia mondo kaj aperigis lian artikolon titolitan "Civitaninoj", kiun ni invitas vin legi hodiaŭ. Ĝi estas atingebla ĉe:

Civitaninoj

El tiu artikolo ni elstarigas tiun ĉi pensigan elprenaĵon:
"Estonteco de la mondo esence dependas de la atento kaj grandanimeco de ties virinoj. Ni havas eksterordinarajn ekzemplojn de virinoj en ĉiuj landoj, de plej famaj ĝis plej simplaj, kaj oni povus komenci per patrinoj".
Bonvole, kara samideano, plusendu tiun ĉi elkoran omaĝon per via retlisto. Anticipe ni tre dankas Vin!
Fine ni, la teamanoj de E-fako de Legio de Bona Volo (LBV), **tutkore kaj tutanime gratulas al ĉiuj Virinoj en la mondo!** *Maria Aparecida da Silva* www.bonavolo.com www.paivanetto.com/eo





3ZZZ Se vi volas subteni la projekton de Anatoli Ionesov pri la internacia letertago "Assalom Naunus" aŭskultu la elsendon de la 5a de Marto por ekscii pri la detaloj. Eksciu pri la danĝero kaŭzita de asteroidoj, kiuj tanĝas la teron.



Informis la kunvokanto, *Franciska Toubale*